


# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 5 Majo, 2012

*Kara Leganto, supraĵe analizante temojn de niaj kunsidoj (ĉefartikolojn de nia bulteno), oni povas konkludi, ke E-o donas nesuperigeblan eblecon vojaĝi tutmonde, ofte dank'al senlacemo de niaj samsocietanoj. Nur ĉi jare ni havis eblecon ekvidi per okuloj de niaj amikoj kaj eksenti Iranon, Anglujon, kiril-abocan parton de la mondo, nin atendas Gvatemalo, Dalaso (Teksaso), eble – Hanojo (!). Do, propagandu E-on, rakontu pri ĝi al viaj neE-aj konatuloj, aŭ vi nur interesiĝas pri Usono? Se jes, ĉi tio similas al Sovetio kun t.n. “fera kurteno”, sed nun oni memstare rektigas kurtenon en onia pensmaniero: “Usono – kaj fino, mondrando!”*

*Post la lirika antaŭparolo oni devas konstati ĝian veron. Baldaŭ ni festos la 125-jariĝon de la IL (26an de Julio), sed taĉmentoj de nia E-societo maldensiĝas: neniu povas haltigi la biologian kaj akcidentan forpason, sed ni pensu pri la freŝaj vizaĝoj en la movado. Rigardu la freŝan agon de nia Prezidanto. Nepre sendu viajn ideojn kaj proponojn al la redakcio aŭ rekten al s-ro Prezidanto. Dankon*  
–La Redakcio

## 100-jariĝo de la E-Nova Testamento (kaj ne nur)



### I.

Versio de Sankta Biblio en Esperanto ĉiam estis grava por agnosko de Esperanto kiel vivanta lingvo. La ekzistado de kompleksa verko kia la Biblio en la E-o, garantias fortan avantaĝon kompare al aliaj planlingvoj/projektoj, ĉar la traduko rolas ne nur kiel propagando, sed ankaŭ kiel pruvido je lingva esprimovo. Ĝi ankaŭ ebligas diservon por la anoj de kelkaj religioj en Esperanto. Komitato estis formita por traduki la Novan Testamenton, kiu eldoniĝis antaŭ cent jaroj – en 1912. La traduko de la Nova Testamento estas influita de la angla Versio Rajtigita de la Reĝo Jakobo, kvankam ĝi estas tre proksima de la greka “textus receptus”.

Zamenhof tradukis la tutan Malnovan Testamenton (la Masoran Bibliion) en Esperanton. Li finis la laboron jam en marto 1915. Tamen anstataŭ tuj sendi la manuskripton eldoncele al la “Biblia Komitato”, li povis nur informi ties prezidanton, la esperantistan pastron John Cyprian Rust, pri grava malhelpo. Zamenhof skribis al li en la franca lingvo: “Bedaŭrinde mi ne povas en la nuna momento sendi al vi la tradukon, ĉar nia poŝto ne transsendas ion (dum la milito), kio estas skribita en Esperanto. Sekve mi devas atendi ĝis la fino de la milito.” Pro tio nur post la unua mondmilito – kaj du jarojn post la morto de Zamenhof – la traduko alvenis en Britio, kaj estis eldonita en 1926. Ene de kvin jaroj pli ol 5000 (!) ekzempleroj de la esperanta Biblio vendiĝis.

### II.

Se E-a traduko de la Sankra Skribo signifas pri la viceco de la IL, agado de la Tesalonikaj fratoj estis direktitaj al kristanigado de la slavaro. Sanktaj Kirilo (iam – Cirilo) kaj Metodo (vd la foton) estis denaskaj fratoj devenantaj el greka urbo Tesaloniko, ĉefurbo de Makedonio, kie ilia patro estis dum la unua duono de la 9-a jarcento altrangulo de la Bizanca imperio. Metodo devene dediĉis sin al oficista metio, sed

subite li forlasis sukcesan karieron kaj fariĝis simpla monaĥo. Konstanteno (pli malfrue Kirilo) elektis eklezian staton tuj fininte studadon kaj li estis sanktigita. El ilia eminenta kono de la slava lingvo oni juĝas, ke ilia patrino havis slavan devenon kaj en la plej nova tempo bulgaraj sciencistoj pruvas, ke ankaŭ la patro de tiuj ĉi apostoloj estis slavo. Ambaŭ fratoj akiris klerecon en grekaj lernejoj. Konstanteno eminentiĝis jam ekde junaĝo de sagaca spirito kaj pieco. Studante en imperiestra kortego li baldaŭ regis ĉiun tiaman klerecon kaj por tio li estis admirata de siaj instruistoj, kiuj donis al li la titolon Filozofo. Li eklernis vicon da lingvoj (krom E-o – red.). Kiel 24-jarulo li estis sendita misie de imperiestro al saracenoj, kie li solenis grandajn sukcesojn en disputoj. Ĉ. la jaro 860 Konstanteno estis kune kun sia frato Metodo sendita fare de la bizancia imperiestro denove al misia vojo, ĉi-foje al ĥazaroj, kiuj vivis oriente de Azova maro kaj rivero Dono (nun unu el ĥazaroj – (ĥ)Azarov – estas ĉefministro de Ukrainio). En ĥazara lando ili konversaciis kun ĥazaroj, judoj kaj saracenoj. La rezulto estis tio, ke ĥazara reganto akceptis kristanismon kiel ilia oficiala religio. Laŭ postulo de moravia princo sankta Rostislav ili estis senditaj al Moravio. Ili anticipe bone prepariĝis al tiu ĉi celo. Sankta Konstanteno kreigis literojn por slava lingvo, li tradukis en ĝin partojn de la Biblio, kiujn oni legas dum diservoj de orienta ceremonio, kaj ili tradukis ankaŭ ĉiujn ceremoniajn librojn: Sanktan Liturgion, Vesperan, Frumatenan, Postvespermanĝan, Noktomezan... kaj aliajn...



La heredaĵo de Kirilo kaj Metodo estis en Bohemio kaj Moravio dure persekutata, sed ĝi pluekstis ĉe bulgaroj, serboj, ukrainoj kaj belarusoj, do ĉe slavaj ortodoksaj nacioj. Sed ankaŭ por Bohemio kaj Moravio, kvankam ĝi estis tie neniigita, ĝi havis sian grandan signifon, ĉar ĉeĥoj fariĝis per faro de la sanktaj Kirilo kaj Metodo kristanoj kaj estis

ŝparitaj de perforta kristanigo. Festotagon de la sankta Cirilo oni solenas en ortodoksa eklezio de pratempo la 14-an de februaro kaj festotagon de la sankta Metodo la 6-an de aprilo, do en la tagoj de iliaj mortoj. Ilia komuna soleno estas solenata en ortodoksa eklezio la 11-an de majo. La verkaro de la sanktaj fratoj el Tesaloniko havis grangegan signifon por la tuta slavaro. Tial estas la sanktaj Kirilo kaj Metodo nomataj apostoloj de slavoj, kiuj metis pastrajn fundamentojn al la slava ortodoksio. En Ukrainio la 24an de Majo oni festas Tgon de la slava skribo, monumentoj al la Fratoj estas en multaj kirilal-abocaj landoj, nur en Ukrainio – en 5 urboj (sur la foto mi kun mia patro en Mukaĉivo, 2011). –V. Pajuk



## Mitap!

Por fariĝi pli videblaj interrete kaj eble varbi novajn lokajn interesitojn pri Esperanto al nia Esperanto Societo de Ŝikago ni decidis provi uzon de la interreta servo nomata “Meetup” (Renkontiĝo). La servo funkcias tudmonde en pluraj lingvoj. Jam en kelkaj lokoj en Usono kaj aliaj landoj fondiĝis Esperanto-grupoj de “Meetup”. Laste nova grupo “Esperanto-Chicago” estis kreita en la kadroj de “Meetup”: <http://www.meetup.com/Esperanto-Chicago>.



“Meetup” komenciĝis en Novjorko tuj post la tragedio de 11 Septembro 2001, kiam oni rimarkis, ke ne sufiĉas nur kontakti per la interreto, sed necesas formi verajn, plenvivajn komunumojn. Meetup estis natura rezulto de la nova bezono havi direktajn personajn kontaktojn. Ne sufiĉas nur klikadi, oni devas direkte vidi la okulojn de alia homo, paroli al li senpere, senti la etoson de la reala kunveno. Ni esperantistoj ja bone komprenas tiun bezonon, tial ni kongresas, kunvenas kaj vojaĝas.

“Meetup” estas tre utila ilo por kunporti homojn kun similaj intereso en la saman lokon je la sama tempo. Membroj aŭtomate estas informataj pri la lokaj kunvenoj aŭ okazaĵoj je la specifa temo. Tial nun ni havas “Esperanto Chicago” inter pli ol mil temoj pri kiuj membroj de “Meetup” estas informataj. Ni esperu, ke tio rezultos je dezirata apero de iuj novaj samideanoj dum niaj regulaj kunvenoj en Sulzer Library en Ŝikago, ĉiun kvaran Mardon de lamonato. “Meetup” povus plivigliĝi nian Societon. Ni vidos, ĉu tiu eksperimento sukcesos. Bonvolu rigardi nian retpaĝon. Nepre aliĝu al “Meetup” (senpage) kaj partoprenu en niaj eventoj por plifortigi nian “Meetup”-grupon. –L. Kordylewski

## ESF Investas en Sukcesojn de Esperanto

Kiam, antaŭ pli ol jardeko, ĝi entreprenis la unuajn paŝojn por krei la retejojn edukado.net kaj lernu.net, la fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF) nur malprecize antaŭvidis la eksplodan disvolviĝon de la “socia” reto tutmonde. Nuntempe komencas vidiĝi la fruktoj de tiuj fruaj vizioj.

Intertempe, la reta revolucio kontribuis al ĝenerala plifortigo de la pozicio de Esperanto inter la lingvoj de la mondo. Tion plej laste signalis la aldonado de Esperanto kiel 64-a lingvo uzata de la Google-tradukejo. La ĉi-suba kolekto de interesaj faktoj pri Lernu montras la kreskantan gravecon de la reta agado de ESF ĉe: <http://esperantic.org> –ESF

## Hitlero kaj Akuzativo

Estimataj e-instruistoj, bonvolu trarigardi proponatan vidaĵon kaj fari konkludon: <http://www.youtube.com/watch?v=sDDqFTjyUDO>. Impresas emocie, ĉu? –NN

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
[www.esperanto-chicago.org](http://www.esperanto-chicago.org)

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Vicprezidanto – Roberto Stalzer  
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library  
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL  
Kunvenoj komenciĝas  
je 7 p.t. en la Suda  
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

22an de Majo – Gvatemalo per okuloj de Marko Shafroth

26an de Junio – S-ro prezidanto raportos pri la Landa Kongreso (Esperanto-Usono)

22an de Julio – Pikniko okaze de la 125-a datreveno de IL

28an de Aŭgusto – Ni estos ricevataj informon pri la UK en Hanojo